

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



EN LA NUMERO:

ISEU'84

LA NOVA LERNO-
JARO

BULGAROJ EN
VANKUVERO

40-A TEJO-
KONGRESO

DU INTERNACIAJ
JUNULARAJ
E-LABORBRIGADOJ


KUN PATRIO EN LA
KOR'

ĈE POLAJ AMIKOJ

MODELA
E-ĈICERONO

LINGVAJ
PROBLEMOJ

VERDAJ STELETOJ



JARO 53 • N-RO 10 • OKTOBRO • 84



DUA SESIO DE ISEU'84

Pli ol 100 esperantistoj el Bulgario, Greklando, GDR, Ĉeĥoslovakio, Francio kaj Finnlando havis la utilan kaj agrablan eblecon partopreni en la regulaj sesioj de ISEU en urbo Veliko Târnovo (23—29-a de julio j. k).

Prof. d-ro Stanjo Georgiev, rektoro de ISEU, sincere salutis la partoprenantojn en tiu grava aranĝo de la Bulgara Esperantista Asocio.

En sia salutparolado la urbestro de Veliko Târnovo Dimităr Zdravkov diris: „Ni esperas, ke nia urbo, rimarkinda per siaj beleco kaj gastamo, garantios la necesajn kondiĉojn por fruktodona laboro de ISEU. Ni estas fieraj, ke en la nun streĉita internacia situacio ni povas ĝui tiujn valoraĵojn, kiuj unuigas kaj kunligas la homojn en la mondo.“

Utilan kaj agrablan semajnon bondeziris ankaŭ Stefan Raškov, prezidanto de la DE de BEA en Veliko Târnovo, s-ino Maria Pontika, prezidantino de la Greka E-Asocio kaj s-ro Peter Rados, Hungario.



Partoprenantoj en la Dua Sesio de ISEU — Veliko Târnovo

La ĝenerala sekretario de BEA Kunĉo Vălev tralegis la salutleteron de d-ro Imre Pethes, prezidanto de MEM.

Dum la sep universitataj tagoj la partoprenantoj en ISEU aŭskultis 18 lekciojn, prezentitajn de 11 lektoroj.

Tjanka Minĉeva, kunlaborantino de la Distrikta Historia Muzeo en Veliko Târnovo, en sia raporto „Pasinteco, nuntempo kaj estonto de Veliko Târnovo“ rakontis pri la historiaj valoraĵoj de la malnova bulgara ĉefurbo, pri la meritoj de la loĝantoj de tiu urbo en la historia sorto de la bulgara popolo.

Olga Cankova, instruistino el Veliko Târnovo, sin prezentis per originala kaj bone argumentita raporto: „Veliko Târnovo — lulilo de la E-movado en Bulgario“.

La lekcioj de la laŭreato de Dimitrov-premio prof. Stojan Ĝuĝev „Lingvaj konfliktoj kaj diskriminacioj en la internaciaj rilatoj“ kaj „Interlingvistika utopiismo“ distingiĝis per sia riĉa kaj interesa enhavo, senriproĉaj lingvo kaj stilo. La lektoro substrekiis, ke solvo de la politikaj problemoj ne eblas sen solvo de la lingvaj problemoj, jen kial la E-movado en la tuta mondo progresas.

Abunde ilustrita kaj enhavoriĉa estis la lekcio „De la petroglifoj ĝis la alfabeto“ de Kiril Drajev, ĵus distingita per la alta titolo „Honora membro de UEA“. Kaj lia dua lekcio „80 tagojn sur la ondoj de la Atlantika Oceano“ respegulas liajn ekskluzive interesajn observojn kaj travivaĵojn de ĵurnalisto dum ofica navigado sur fiŝista ŝipo. Talente prezentita, lia lekcio emociis ĉiujn aŭskultantojn.

Aparte utilaj por nia praktiko de lektoroj, instruistoj kaj ordinaraj esperantistoj estis la lekcioj de la aktorino Belka Beleva — „Pri la retoriko“, „Kiel prelegi elokvente“ kaj „La poeto naskiĝas, la oratoro fariĝas tia“. Ŝi allogis rakontis pri plejado da talentaj oratoroj de la antikveco ĝis nun kaj faris vicon da konkretaj rekomendoj pri sukcesa sinprezento de lektoroj-esperantistoj. Siaj lekcioj estiĝis motivo por vigla diskutado.

Kio estas sano? Kia estas la rolo de medio (hejmaj, profesiaj k. a. faktoroj) pri la homa sano? — al tiuj aktualaj demandoj donis elĉerpan respondon prof. Kiril Popov en sia lekcio „Homo, sano kaj socio“. Grandan intereseon vekis ankaŭ lia dua temo „Nuntempaj teorioj pri la kancerogenezo“.

Aktualajn kaj utilajn informojn prezentis al la ĉeestantoj Violin Oljanov („La problemoj pri land-nomoj“ kaj „Transskribo de propraj nomoj“) kaj Kunĉo Valev („Pri iuj eraroj en nia E-parolado“ kaj „La lingva nivelo de partoprenantoj en ISEU“).

La hungara pedagogo kaj ĵurnalisto Peter Rados klarigis la esencon de la nova „superintensa“ kurso por instruado de Esperanto, la t. n. „pirata metodo“.

(Sekvas sur p. 2)



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 53

OKTOBRO

10 • 1984

ĈE LA SOJLO DE LA NOVA LERNOJARO

La nova lernojaro komenciĝis kiel kutime. En multaj lernejoj, kie oni instruis la Internacian Lingvon dum la pasinta lernojaro, la instruistoj jam delonge preparis sin por instrui Esperanton al siaj lernantoj. Dum la somero ili refreŝigis siajn lingvokononajn kaj metodikan sperton, partoprenante porinstruistajn E-aranĝojn aŭ per memstara studado. Ili preparis ĉiujn necesajn instruhelpilojn (diaskopo, kasedofono, projekciilo por diapozitivaj, grafoskopo, bildoj, gramatikaj tabeloj k.a.) kaj jam estas pretaj por sia instru-metodika laboro. Krome, en multaj lernejoj, kie Esperanto estos instruata kiel fakultativa studobjekto, ties instruado jam delonge staras en la tutlerneja programo. Por la ceteraj grupoj de lernantoj, kie Esperanto estos instruata en studrondoj, estas jam garantiitaj la necesaj financaj rimedoj por pagado al ties gvidantoj. Dum la pasinta lernojaro pretiĝis instrui la Internacian Lingvon en lernejoj ankaŭ dekoj da E-instruistoj, kiuj jam bone trastudis la Metodikan Gvidlibron por la E-instruisto kaj kun fervoro komencos unuafoje instrui Esperanton al siaj lernantoj. Ili sekvos la ekzemplon de siaj pli spertaj gekolegoj kaj laŭeble vizitados fojfoje ilin dum instruado de Esperanto en klaso aŭ en studrondo por akiri sperton. Ili daŭre pristudos iujn artikolojn pri instrulaboro en la bulteno „Informilo“, aperanta ĉiumonate dum la lernojaro (eldonaĵo de la Instruista Sekcio (IS) ĉe BEA pri la instrua laboro en Bulgario). Tie ili povos trovi ankaŭ adresojn por korespondado kun eksterlandaj esperantistoj. Krome, en la suplemento ili trovos facilan legaĵon por siaj E-lernantoj kaj uzante la enhavon de la rubriko „Infana Mondo“ ili povos variigi sian en- kaj eksterklasan E-laboron. Tuj post la komenco de la E-instruado en klasoj kaj studrondoj la E-instruistoj devas fondi Lernejan Esperanto-Klubon (LEK) kun prezidanto, sekretario kaj kasisto (lernantoj). Helpate de sia E-instruisto, ili havos sian propran eksterklasan aktivaĵon (deklamado, kantado, dancado, surscenigo de teatraĵoj, vizitoj de muzeoj,

teatroj, koncertoj, ekspozicioj, ekskursoj k. a. Estus bone, se ĉiu LEK sendus sian adreson por publikigo sur la paĝoj de la „Informilo“ por tiamaniere povu kontakti kun la ceteraj E-kluboj de lernejoj, interŝanĝante leterojn kaj vizitojn.

Ni tamen bone scias, ke ne en ĉiu lernejo estas instrupretaj, instrurajtaj E-instruistoj. Eble ne estas lernejoj, kie la lernantoj ne interesiĝas pri Esperanto. Tial ni devas varbi el la medio de la profesiaj instruistoj (precipe inter la filologoj) novajn adeptojn de la Internacia Lingvo, kiuj ekludu Esperanton dum la nova lernojaro. Tiucele la lokaj E-societoj, la distriktaj estraroj de BEA devas fari vastan propagandon por nia lingvo en instruistaj medioj kaj organizi kursojn de Esperanto de 1-a kaj 2-a gradoj. Ili nepre devas sendi profesiajn instruistojn al la feriaj porinstruistaj kursoj, kiujn organizas ĉiujare la Instruista Sekcio (en januaro* kaj aprilo* en Sofio kaj Bankja) kaj somere** (de la 1-a ĝis la 20-a de julio kaj de la 1-a ĝis la 20-a de aŭgusto en la Internacia E-Kursejo en Pisanica, apud Smoljan). Ili devas pretigi ankaŭ la liston de profesiaj E-instruistoj, kiuj partoprenos la somerajn porinstruistajn kursojn, organizatajn dum la lastaj tri jaroj de CIUURK*** (Centra Instituto por Perfektigo de Instruistoj — Filio de la Ministerio de Popola Klerigado), kiuj okazas kutime en la komenco de julio kaj estas tute senpagaj por la partoprenantoj-instruistoj. (Bedaŭrinde, ĉi-somere alvenis dek instruistoj malpli ol la planita nombro, ĉar iuj lokaj E-societoj kaj distriktaj estraroj de BEA ne sufiĉe aktivis sur tiu kampoj kaj ne sendis instruistojn el sia teritorio).

La Instruista Sekcio siaflanke same aktivos dum la nova lernojaro, pretigante novajn lernolibrojn kaj pliajn instruhelpilojn. Estas jam fakte, ke la Sofia DE de BEA (kunlabore kum IS)

aperigis unuan serion de diapozitiva filmo helpe al la instruado de Esperanto dum la unua studjaro. Dum la kuranta lernojaro aperos la dua serio de tiu filmo, por la dua studjaro. Estas preparita ankaŭ Bildvoortaro. Gis la fino de la kalendara jaro aperos surbendigoj de lecionoj el la lernolibro por lernejoj. Dum la nova lernojaro la Instruista Sekcio pretigos por presado gramatikajn tabelojn (laŭeble multkolorajn) kaj aliajn helpilojn. Dum la kuranta jaro la eldonejo „Popola Klerigado“ aperigos novan version de la Gvidlibro por E-instruistoj — por la unua kaj dua studjaro de Esperanto en lernejoj.

Dum la nova lernojaro por unua fojo en Bulgario Esperanto estos instruata kiel egalrajta (fremda lingvo paralele kun angla) en 8-a meza politeknika lernejo en Sofio. Laŭ speciala programo kun tri instruhoroj semajne dum tri studjaroj. Tiu instruado estos eksperimenta, kun speciala permeso fare de la Ministerio de Popola Klerigado. La eksperimento finiĝos en 1987, kiam ni celebros la 100-jariĝon de la Internacia Lingvo. Ni esperas, ke venontjare ni havos permeson instrui Esperanton sammaniere ankaŭ en aliaj lernejoj, kie estas spertaj E-instruistoj. E-instruistoj-filologoj havos la taskon fari la samon en la lernejoj, kie ili oficas, tial ili devas prepari sin por modela instruado de Esperanto. Ili devas ĝustatempe informi la Instruistan Sek-

cion ĉe BEA pri sia intenco, kaj tiu lasta prezentos ĉiujn petojn al la Ministerio de Popola Klerigado.

Dum la nuna lernojaro la instruistoj de Esperanto kaj la kursgvidantoj povos uzi ankaŭ la bonan interhelpilon „66 Bildoj“ de Neno Janev. Por faciligi la organizadon kaj efektivigon de E-kursoj por plenkreskuloj, la Instruista Sekcio ĉe BEA aperigis 82-paĝan poŝformatan broŝuron sub la titolo „Programoj kaj regularoj de E-instruado en civitanaj kursoj“.

Por personoj, kiuj studas Esperanton aŭtodi-dakte kaj por kursgvidantoj dum la kuranta lernojaro aperos kelkaj novaj lernolibroj por 1-a kaj 2-a gradoj, verkitaj de diversaj aŭtoroj. Du el ili estas distingitaj per 1-a premio en speciala konkurso por lernolibroj, organizita antaŭ du jaroj de IS. Dum la sama periodo la mondkonata bulgara sugestologo d-ro Georgi Lozanov eble sukcesos prepari la de li promesitan lernolibron de Esperanto laŭ lia propra sugestopedia metodo.

Al ĉiuj E-instruistoj kaj E-kursgvidantoj, al ĉiuj aktivuloj okupiĝantaj pri instruado de Esperanto, ni bondeziras sukcesan laboron!

*1-a, 2-a kaj 3-a gradoj

**1-a, 2-a, 3-a gradoj kaj kurso por instrurajtoj

***2-a, 3-a gradoj

MARIN BACEV,
ĉefa metodikisto
ĉe CE de BEA

DUA SESIO DE ISEU'84

(daŭrigo de p. 11)

La muzika pedagogino Györgui Mezes lerte pritraktis la temon „Hungaraj ciganaj muzikistoj kaj ilia muziko“.

Dank' al sia persona ĉarmo kaj kontaktemo la prezidantino de la Helena Esperantista Asocio (HEI) s-ino Maria Pontika, juristo laŭprofesie, rapide estiĝis centro de atento. En sia lekcio „La nuntempa greka familio“ ŝi interese rakontis pri la faktoroj, kiuj difinas la evoluon de la nuntempa greka familio, pri ŝanĝoj en la greka leĝfardo, celantaj faciligi la sorton de la greka virino — edzino kaj patrino. S-ino Pontika malkovris diversajn trajtojn el la spirita portreto de la nuntempa greka virino („La nuntempa grekino“).

Tre agrable pasis ankaŭ la jam tradiciaj ekskursoj al la pentrinaj loĝlokoj Arbanasi, Bojenci kaj Etâr. En Gabrovo — la bulgara ĉefurbo de humuro kaj satiro, la partoprenantoj trarigardis la novan planedaron. Admiron elvokis ankaŭ la kavernoj „Baĉo Kiro“ apud

la Monaĥejo de Drjanovo. La gastoj de Veliko Târnovo trarigardis ankaŭ ĝiajn historiajn vidindaĵojn, ĝuis ĝian neripeteban belecon.

Menciindas ankaŭ la koncerto kun partopreno de la operkantistino kaj esperantistino Jana Cikalova, la popola kantistino Dobrinka Todorova k. a. partoprenantoj en ISEU.

Nerimarkite, sed tre utile pasis por la esperantistoj — partoprenantoj en ISEU la universitataj tagoj. ISEU estas utila kaj necesa arango por perfektigo de la lingva nivelo, por plialtigo de la ĝenerala kaj speciala kulturo de la esperantistoj el Bulgario kaj alilando, formo por amikaj kaj kulturaj kontaktoj.

STEFKA ĈENKOVA

**ĈU VI JAM ABONIS
REVUON „BULGARA ESPERANTIS-
TO“ POR 1985?**



KUN PATRIO EN LA KOR'



Tre malmultaj estis tiuj, kiuj eksciis pri la morto de Jordan Tabakov el Dobri Djal, distrikto de Veliko Târnovo, en 1978.

Mi havis la feliĉon kelkfoje vidi tiun bonaniman homon kaj aŭskultadi rakontojn pri liaj travivaĵoj en eksterlando, kie li travivis 40 jarojn. Mi surbendigis lian voĉon kaj nun mi havas eblecon denove aŭskulti lin. Kaj ŝajnas al mi, ke li reviviĝas.

La biografioj de iuj homoj estas plataj kiel plugita kampo. Vivis la homo trankvile kaj nenian spuron lasis post si.

Tute alia tamen estas la biografio de Jordan Tabakov. La revoluciuo el Dobri Djal jam kiel 13-jara lernanto estiĝis ano de la Komso-molo. Ĉiutage li vizitis la klubejon de striktaj socialistoj. Tie la komunistaj funkciuloj Sotir Zrinov, Panajot Cviĉev kaj Boris Bogdanov prelegis regule. „Malgraŭ ke mi estis etulo kaj ne membris en la partia organizaĵo, mi regule ĉeestis kunvenojn“ — skribis J. Tabakov en sia aŭtobiografio. — „Oni nomis min „infano de la klubo“. Tiu medio favoris la formigon de la estonta profesia revoluciuo.

Pro siaj komunismaj ideoj la 2-an de aprilo 1923 J. Tabakov estis arestita kaj kruele tor-

turita de policianoj. Tamen li restis fidela al la komunismaj ideoj. La ŝtalo ja estis jam hardita.

La 24-an de septembro 1923 tri armitaj homoj atakis lin ekster lia naskiĝvilaĝo. La juna revoluciulo povis atingi la plej proksiman arbaron kaj kaŝis sin. Sed post nelonge sekvis nova aresto. Oni liberigis lin kiel neplenagaŭlo.

Post la atenco en la preĝejo „Sveta Nedelja“ en Sofio la 16-an de aprilo 1925 fare de anarkistoj, sekvis amasaj arestoj. J. Tabakov estis denove arestita. Dum la juĝproceso en G. Orjaĥovica li kuraĝis diri al juĝisto de la militista tribunalo, ke oni praktikas nehumanajn torturojn.

— Vi meritas pendigilon! Mi plezure piedpuŝus la seĝon sub viaj kruroj, — diris la prezidanto de la tribunalo.

— Sed kiam ni prenos la regpotencon, mi ne faros al mi tiun plezuron — dece respondis J. Tabakov.

Sinsekvis jaroj en la malliberejo de Veliko Târnovo. Tiutempe J. Tabakov lernis Esperanton fervore. Tiu lingvo estiĝis tre utila por li.

Elirinte el la malliberejo, dungitaj murdistoj denove persekutis lin. Tio komprenigis al li, ke vivi en sia patrio ne eblas plu. Pro tio li forlasis Bulgarion. Tamen ĝi restis en lia koro.

J. Tabakov ekloĝis en Adrianopolo kiel kamplelaboristo. Tio permesis al li labori kaŝe. En 1927—1930 li estis membro de SAT kaj regule ricevis la revuon „Internaciisto“. Li estiĝis persona amiko de Nazam Hikmet. Kune ili skribis lernolibron de Esperanto. En Adrianopolo kaj Istanbul J. Tabakov multe korespondis en Esperanto. Ĉiutage 30—40 leteroj venis por li el eksterlando. Multajn leterojn li ricevis el Sovet-Unio. Evĝeni Melnik el Moskvo tradukis liajn leterojn el Esperanto en rusan lingvon por la revuo „Ogonjok“.

Iom post iom J. Tabakov estiĝis funkciulo de la „sekreta fronto“ kaj plenumis respondecajn taskojn, starigitajn de la komunista partio.

La partia funkciulo Sterju Atanasov en sia libro „Notoj de revoluciuo“ skribis, ke la punkto, kiun gvidis J. Tabakov estis tute sekrete organizita, ĉiuj taskoj ĝustatempe kaj akurate farataj. Nenia fiasko okazis.

40 jarojn J. Tabakov portis la patrimon en sia koro, vivis ĉiam minacate. „Ĉiuvespere, kuŝinte, mi ne estis certa, ĉu la matenon mi estos viva“ — rakontis li al mi post sia reveno en Bulgarion en 1972.

Plenuminte digne sian civitanan kaj komunistan devon li revenis hejmen. Li preferis vivi en sia naskiĝvilaĝo. Tie li kuŝas nun en la tero. Tiu, sur kiu li naskiĝis kaj kiu estas la plej kara.

ĤRISTO MEDNIKAROV
Esperantigis: Olga Cankova

69-a Universala Kongreso de Esperanto



Vankuvero (Kanado),
21-28.VII.1984

BULGAROJ EN VANKUVERO

La 16-an de julio ĉi-jare, kune kun miaj samlandanoj Veska Nakova kaj Ekaterina Maneva, mi ekveturis per aviadilo el Beogrado tra Nov-Jorko al Montrealo por partopreni la antaŭkongresajn aranĝojn. Nin bonvenigis la respondeculino s-ino Louise Labelle kaj tre afable aranĝis nian partoprenon. En la antaŭkongresaj aranĝoj partoprenis 61 personoj el diversaj landoj. La organizantoj estis preparintaj riĉan programon. Per luksa aŭtobuso ni grupe ekskursis tra Montrealo, konatigis kun ĝiaj vidindaĵoj. La insulon de Montrealo ĉirkaŭas unu el la plej belaj riveroj en la mondo — Sankta Laŭrenco. Situantaj ĉirkaŭ la Reĝa Monto (Mont Royal), la urbego dominas super la tuta ĉirkaŭaĵo. Ni vizitis la malnovan parton de Montrealo, la Olimpikan Parkon, la Botanikan Gardenon, la planedaron, kelkajn muzeojn kaj aliajn rimarkindaĵojn. Interesa estis ankaŭ nia vizito en urbo Kebeko, ĉefurbo de Kebekio — unu el la plej belaj kanadaj urboj.

La 21-an de julio ni forveturis al la kongresurbo Vankuvero. Alveninte, ni malfacile transportiĝis al la Universitato de Brita Kolumbio pro striko de aŭtobusaj ŝoforoj el la urba trafiko. La universitato situas sur 396-hektara tereno, kie troviĝas botanika ĝardeno kaj japana ĝardeno, artgalerio, biblioteko, muzeoj pri antropologio kaj geologio, naĝejo kaj plaĝo, interesa horloĝturo, komfortaj studentaj loĝejoj „Gage“ kaj „Totem“. En loĝejo „Gage“ estis enloĝigita la pliparto de la kongresanoj. La saman tagon okazis interkona vespero.

Laŭ sia situo kaj beleco Vankuvero estas komparebla nur kun Rio de Janeiro. La ĝenerala vidaĵo de la urbo estas rava. Impresas la abundo de floroj en la domoj kaj la puréco, kiun oni konstatas ĉie en Kanado.

Post du jaroj Vankuvero celebros sian centjariĝon. La urbo ricevis sian nomon de la fama

brita kapitano George Vancouver, kiu en 1791, komisiita de la brita registaro, detale esploris kaj surmapigis la Pacifikan marbordon de la nordamerika kontinento. Li estis la unua navigisto, kiu ĉirkaŭiris la grandan insulon, sur kiu nun situas la ĉefurbo de Brita Kolumbio — Viktoria.

La solena inaŭguro de la kongreso okazis la 22-an de julio en la impona salonego de la kongresejo. Partoprenis 801 kongresanoj, inter kiuj 12 bulgaraj esperantistoj.

La programo estis vere afereca. Pli ol 35 kongresanoj, precipe el Usono kaj Kanado, partoprenis la MEM-kunvenon. Raportoj pri la agado de la pacdefendantoj-esperantistoj estis faritaj de Tibor Vaskó kaj d-ro Endre Baráth el Hungario kaj inĝ. Maria Taševa (Bulgario). La kunvenon salutis s-ino Susan Henderson el Nov-Zelando, kiu rakontis pri la 600-kilometra pacmarŝo de virinoj, kies petskribo por paco estis prezentita al la ministro-prezidanto de la lando.

Tre grava momento estis la anonco, farita de Tibor Vasko, ke inter UEA kaj MEM estas subskribita kontrakto, laŭ kiu MEM estiĝas kunlaboranta ne-neŭtrala faka asocio de UEA (en la senco de p. 15 de la Statuto de UEA). Tio estas grava rekono de la agado de MEM, de ĝiaj noblaj celoj kaj penoj kontribui al la firmigo de la monda paco.

Okazis kunsido de la Komisiono de Virina Agado ĉe UEA kaj kunveno pri virina agado, kiun partoprenis 48 virinoj. Estis traktitaj nur du punktoj: raportoj kaj proponoj pri estonta laboro. Estis faritaj raportoj pri la aktivado de virinoj-esperantistinoj el Bulgario, Japanio, Svedio kaj Usono. La proponoj rilatis publikigon de artikoloj de virinoj en revuo „Esperanto“ de UEA kaj la diskuttemon „Komputado kaj virinoj“ dum la 70-a UK en Augsburg (FRG).

Dum la kunveno de UMEA (15 kongresanoj-medicinistoj el 7 landoj) la ĉeestantoj aŭskultis prelegon de d-rino Angelina Banica el Rumanio pri akupunkturo. Estis anoncite, ke la sekvontaj konferencoj de Universala Medicinista Esperantista Asocio (UMEA) okazos en 1985 en GDR kaj en 1987 — en Krakovo, Pollando.

Ankaŭ fervojistoj-esperantistoj okazigis sian kunvenon, kiun partoprenis 15 kongresanoj el 10 landoj. S-ro Istvan Gyulas (Hungario), kiu gvidis la kunvenon, raportis pri la 36-a IFEF-kongreso, okazinta en Slănčev Brjag, Bulgario, en majo ĉi-jare. Li detale rakontis pri la riĉa kongresa programo, pri la gastamo de la bulgaraj dommastroj kaj konigis al la ĉeestantoj la akceptitan de la kongreso rezolucion. La kunvenon ĉeestis inĝ. Petăr Todorov, estrarano de UEA pri faka agado, kiu alte taksis la agadon de IFEF. Estis unua-


nime esprimita la deziro pri plifirmigo de la rilatoj inter IFEF kaj UEA.

Grandan interesigon provokis la kunsido de la Jubilea Komisiono de UEA pri celebrado de la 100-jariĝo de Esperanto en 1987. La prezidanto de UEA s-ro Maertens raportis pri la nuna stato de la jubilea aktivado en diversaj landoj kaj pri la antaŭviditaj aranĝoj mondscale.

Varia kaj aferece riĉa estis la programo de la kunsido de la Komitato de UEA. Estis aprobitaj la bilanco por 1983 kaj la budĝeto por 1985. Grava momento estis la elekto de novaj membroj de la Honora Patrona Komitato — Paul Ariste, Estona SSR, mondfama lingvosciencisto kaj Hujcz el Ĉina Popola Respubliko, kaj kiel honoraj membroj de UEA estis aprobitaj Emanuel Chicot (Francio), Kiril Drajev (Bulgario), Miyamoto Masao (Japanio), Juan Regulo Perez (Hispanio) kaj Bruno Vogelmann (FRG).

La Komitato de UEA aprobis ankaŭ la kandidatecojn por la venontjaraj UK de Esperanto: 1985 — Augsburg (FRG), 1986 — Pekino (Ĉinio), 1987 — la Jubilea Universala Kongreso — Varsovio (Pollando), 1988 — Aŭstralio, 1989 — Britio.

Por mi kaj por miaj samlandanoj la 69-a Universala Kongreso de Esperanto en Kanado estis grava evento, kiu donis al ni novan gran-



Ĝenerala vidaĵo de la kongresurbo Vankuvero, Kanado

dan sperton pri aktivado sur internacia kampo, novajn gravajn konojn pri la vivo de transatlantikaj landoj kaj ĉefe — kontaktojn kun novaj amikoj, kiuj firme esprimis sian volon vivi kaj kunlabori en paca mondo.

Vankuvero — Sofio,
julio — aŭgusto 1984

Inĝ. MARIA TAŜEVA

40-A TEJO-KONGRESO EN SWANWICK

Pasis la neforgeseblaj tagoj de la 40-a Internacia Junulara Kongreso en Swanwick, Britio. Por ĉiuj 293 partoprenantoj el 25 landoj ĝi estis ne nur labora, sed ankaŭ feria semajno, karakterizata per amika kaj ĝoja atmosfero.



La Hayes-Konferenccentro en Swanwick, Britio

La brita insulo akceptis nin tiel suna, ke ni ne povas plu kredi al tiuj, kiuj parolas pri „nebula“ Anglio. Dum kelkaj tagoj antaŭ la kongreso ni faris ĉion eblan por vidi la rimarkindaĵojn de Londono — la fortikaĵojn kaj ponton Tower, la Westminster-Abatejon, la Justic-palacon, la imponan konstruaĵon de la katedralo Sankta Paŭlo (St Paul's Cathedral), la Britan Muzeon (British Museum). Kompreneble, la tempo tute ne sufiĉis por vidi ĉion.

La Landa Kongresa Komitato sukcesis aranĝi, ke la kongreso okazu en la bela kongresa centro de Swanwick. En granda belega parko kun multaj arboj kaj buntaj floroj troviĝas kelkaj luksaj domoj, en kiuj ni loĝis. Antaŭ pli ol unu jarcento la parkoj kaj la domoj apartenis al monaĥejo. Nun ili estas transformitaj en belan kongresan centron.

Indas noti, ke la kongreso estis pli bone organizita ol multaj ĝis nun. Pri tio klopodis malgranda grupo de junaj anglaj esperantistoj, kiuj senlace laboris antaŭ kaj dum la kongreso. Kongresa temo estis „Homo kaj maŝino“ — temo vasta kaj diskutinda. Maŝinoj ĉiuspecaj troviĝas ĉie, maŝinoj helpas la homon, la socion, faciligas la ĉiutagan vivon,

sed ili ankaŭ timigas, katenigas kaj senlaborigas. Al la problemoj pri rilatoj **homaro-maŝinoj** estis dediĉitaj multaj sciencaj prelegoj. Tamen oni traktis kompreneble, nur kelkajn aspektojn de tiu granda problemoj: „Cerbo, menso kaj maŝino“, „Homo, maŝino kaj medio“, „Sociaj sekvoj de scienc-teknika progreso“, „Humoro kaj maŝino“, „Muziko kaj maŝino“, k. a. Estis ordigita speciala ĉambro, en kiu ĉiuj dezirantoj povis provi aŭ lerni funkciigi komputilojn.

Krom la ĉefaj prelegoj okazis kursoj de Esperanto, de britaj popoldancoj, kroket-ludo k.a. La kurso de mediteraneaj dancoj ege plezurigis ne nur dancantojn, sed ankaŭ publikon, kiam fine ili prezentis malgrandan spektaklon.

Okazis du tre gravaj publikaj kunsidoj. En la unua la Estraro de TEJO proponis al ĉiuj kongresanoj venontjare partopreni la Internacian Festivalon de Studentoj kaj Junularo en Moskvo. Oni decidis, ke la junaj esperantistoj aktive partoprenu kun speciala programo por popularigi la Internacian Lingvon kaj ĝiajn ideojn pri paco kaj amikeco. En la dua kunsido la antaŭ nelonge fondita organizaĵo „Junaj Esperantistoj de Svislando“ oficiale aliĝis al TEJO kaj raportis pri siaj sukcesaj paŝoj.

La kulturaj aranĝoj estis organizitaj laŭ

konata kongresa tradicio. La LKK-anoj mem estis plenumantoj en la pliparto de la programoj kaj estigis agrablan etoson dum la liberaj vesperhoroj. Multe da muziko, dancoj kaj ludoj plifaciligis la kontaktojn inter la gejunuloj. Plej interesa vespero estis la kostumbalo kun multaj maskitaj partoprenantoj.

Dum la teatra vespero oni projekciis la tre popularan dum la 60-aj jaroj kriminalan filmon „Angoroj“, sonigitan en Esperanto.

Se mi devas elekti la plej interesan impreson, verŝajne ne nur mi montrus la renkontiĝon kun William Auld. En sia sprita prelego li per multaj argumentoj disbatis la miton pri universaleco de la angla lingvo kaj samtempe substrekiis la avantaĝojn de Esperanto. En persona interparolo Auld ne preterlasis la okazon esprimi siajn bonajn impresojn pri Bulgario, pri la ĝentileco kaj bonkoreco de nia popolo.

Krom la tuttaga ekskurso, okazis ankaŭ kelkaj aliaj. Ni havis eblecon viziti fervojan muzeon, bierfabrikon kaj aliajn proksimajn vidindaĵojn.

La tagoj de la 40-a IJK pasis rapide, sed en niaj koroj restis daŭraj agrablaj rememoroj. Ni disiĝis kun varma deziro pri venontaj renkontiĝoj.

STELIANA DIMITROVA

JUNA ESPERANTISTO

KOMUNAJ LABORO KAJ LINGVO AMIKIGAS...

Kuraĝigite de la bonaj rezultoj pasintjaraj, ĉi-somere — de la 1-a ĝis la 20-a de aŭgusto, la Distrikta Estraro de BEA en Pleven, sub la aŭspicio de Distrikta Komitato de la Kom-somolo kaj la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ denove organizis Internacian Esperantistan Junularan Laborbrigadon „Cvetan Spasov“ en vilaĝo Pobeda, regiono de Pleven.

Sur la gren- kaj legomkampoj de la ĉevalbredejo „Georgi Dimitrov“ en vilaĝo Pobeda entuziasme kaj obstine laboris 100 gejunuloj-esperantistoj el Bulgario, Pollando, Jugoslavio, Rumanio, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario kaj Hispanio, kiuj helpis por kolektado de la abunda rikolto.

Dum la rapide forflugintaj dudek tagoj sur la laborkampoj abunde ekfloris kaj donis fruk-

tojn la internacia solidareco kaj amikeco de la brigadanoj-esperantistoj.

La brigadestro Ivajlo Hristov, studento de medicino, kaj liaj helpantoj Hristo Ivanov, Jordanka Nikolova, Ceco Ivanov, Ivan Petrov apogante sin sur la pasintjara sperto, sukcesis organizi rezultodonan laboron, atingi bonan disciplinon kaj precipe — krei agrablan internacian junularan etoson.

Ĉiumatene — ĉe sunleviĝo, la bulgara nacia flago kaj la esperanta verdstela standardo ekflirtadis sur la pilono en la korto de la brigado kaj la brigadanoj, ricevinte la labortaskojn por la tago, gaje kantante, sin direktadis al la kamparo.

La posttagmezojn kaj la vesperojn la brigadanoj ĝuis riĉenhavan artan-muzikan prog-

ramon, kiun prizorgis Jordanka Nikolova. Dancoj, filmprojekciado, komuna kantado, vesperoj de la diversaj naciaj laborgrupoj, ekskursoj al Pleven kaj tra la regiono, renkontiĝoj kun la laborkolektivo de uzino „Mizia“ kaj kun gejunuloj el Pleven, vizito de historiaj lokoj, ligitaj kun la bataloj de la bulgara popolo por liberigo elsub la osmana kaj faŝisma jugo — jen estas kelkaj el la programeroj de la kultura vivo de la brigado.

Apartan mencion meritas la organizita Vespere de Bulgario, dediĉita al la 40-jara jubileo de la socialisma revolucio en Bulgario. En ĉeesto de multaj gastoj el Pleven kaj el la regiono la bulgaraj brigadanoj plenumis altnivelan artan programon. La brigadestro rakontis al la gastoj pri la laboro de la brigadanoj, substrekinte, ke ili ne nur atingis bonajn rezultojn en la rikoltado, sed kio estas plej grava, starigis senperajn kontaktojn inter la junaj

geesperantistoj el diversaj landoj, esprimis sian volon vivi kaj kunlabori en paco kaj amika interkompreniĝo.

Dank' al la senpera kaj favora helpo de la membroj de la distrikta kaj urba estraroj de BEA en Pleven — Vâlka Dobрева, d-rino Emilia Kanjovska Pantalej Gospodinov, Vâcka Petrova, k.a., la laborbrigado sukcese plenumis ĉiujn siajn taskojn, ĝuis la amikan rilaton de la esperantistoj el Pleven, ilian zorgon pri komforto, nutrado kaj amuzado.

La Internacia Esperantista Junulara Laborbrigado en Pleven jam estiĝas tradicio. Ĝi estas vera forĝejo de amikaj senperaj rilatoj kaj de internacia solidareco inter junaj esperantistoj el multaj landoj, kiuj forportas hejmen sian raviĝon de Bulgario, konojn pri nia socialisma sociordo kaj plej sincerajn sentojn al siaj bulgaraj amikoj.

D. KAMENOPOLSKI

FERVORE KAJ ĜOJE EN BREZE

Frumateno. La suno ĵus aperis super la pitoreske situanta vilaĝo Breze en Okcidenta Balkan-montaro. La brigadanoj jam viciĝis kaj baldaŭ ekveturos per malgranda aŭtobuso al la ĉirkaŭaj herbejoj por kolekti kaj stakigi la falĉitan fojnon. Sur iliaj vizitaĵoj brilas ridetoj, aŭdiĝas rido.


Tiel komenciĝis la labortago, kiun ni pasigis en v. Breze, distrikto de Sofio, gaste al la Internacia Mezlernejana E-Laborbrigado „Mladen Stojanov“. La brigado estas komuna iniciato de la Komunuma Komitato de Komsomolo en Svoĝe kaj de DE de BEA — Sofio. La brigado funkcias de la 16-a de julio ĝis la 15-a de aŭgusto j.k. En ĝi partoprenis 76 mezlernejoj el Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio kaj Bulgario (el Svoĝe, Samokov, Slivnica, Dolna Banja, Zlatica kaj Botevgrad). El ili 44 junaj esperantistoj formis taĉmenton, gvidatan de Bistra Dojĉinova — organizanto ĉe DE de BEA — Sofio.

Impresis la bonegaj vivkondiĉoj — nove konstruitaj loĝejoj, pura manĝejo, konstanta akvoprovizo — ĉio je la necesa nivelo. La kuiritaj manĝaĵoj estis transportataj al la laborbloko. Tie oni tagmanĝis ĉe kampokondiĉoj.

— Jam de la komenco mem la brigadanoj montris labordiligentecon, kvankam multaj el ili por unua fojo tenis rastilon en la mano — diris la komandanto Georgi Georgiev, organizanto ĉe la Komunuma Komitato de Komsomolo, Svoĝe. — Ili konscie kaj bonkvalite plenumas la labornormon — ĉiutage kolektas la falĉitan fojnon sur 1,5 ardekoj. Kreiĝis laborkapabla kaj unueca kolektivo.

Post la ripozo venis la plej gajaj horoj en la brigado. La plano de kultura kaj eduka laboro inkluzivis multe da interesaj aranĝoj: interkona vespero, sanprelego, renkontiĝo kun nevo de la heroo-antifaŝisto Mladen Stojanov, dancvesperoj, vespero de humuro.

Tre sukcesa kaj riĉenhava estis la vespero, dediĉita al Esperanto. Ĝin organizis kaj gvidis Bistra Dojĉinova. Ŝi prelegis pri la Internacia Lingvo — rimedo por interkompreniĝo kaj amikiĝo de la popoloj. La prelegantino prezentis ankaŭ la agadon de UEA, TEJO kaj rakontis pri la pasintjara Internacia Junulara Kongreso en Debrecen (Hungario), informis pri la Esperantaj gazetaro kaj radioelsendoj. Belartan programon prezentis lernanta E-gru-



E-taĉmento el la Internacia Lernejana Esperantista Laborbrigado en Breze

po el Svoĝe sub la gvido de Elena Radenkova kaj Lioneta Petrova.

En la sportkomplekso de ĉokolada fabriko „Republika“, Svoĝe okazis ankaŭ atentokaptaj sportkonkursoj kun alia mezlernejana laborbrigado — pri futbalo, naĝado kaj manipilko. Krome, oni vizitis la laborejojn de la fabriko kaj manĝis ĉokoladaĵojn.

Per sia fervora laboro distingiĝis la brigadanoj Edit Bratanova, Diljana Petrova (ambaŭ el Botevgrad), Lili Ivanova (Slivnica),

Reni Trajkova (Dolna Banja), Vladimir Krâjanov (Samokov). Diligente laboris ankaŭ la eksterlandaj partoprenantoj el Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio.

La iniciato de la Komunuma Komitato de Komsomolo — Svoĝe kaj Distrikta Estraro de BEA — Sofio plensukcesis. Estus bone, se ĝi estigos tradicia ĉiujara aranĝo.

EUGENI GEORGIEV

NOVA INFANA E-KLUBO

Plenumante la kompleksan programon por disvolvo de la E-movado en la Sofia Kolarov-subdistrikto, dum la unuaj tagoj de la kuranta jaro en la subdistrikta Junpionira Domo komencis funkcii Infana Esperanto-Klubo „Standardo de la Paco“.

Laŭ la statuto, konfirmita de la Subdistrikta Komitato de la Komsomolo, en la kluborajtas membri infanoj 7—15 jaraĵ, kiuj havas talenton pri la artoj.

Per sia aktivado la klubo unuigas la ideojn de la esperantista movado kun tiuj de la jam fama en la mondo infana movado „Standardo de la Paco“.

Dank' al la helpo kaj financa subteno de la Urba Estraro de BEA en Sofio, en aprilo 1984 20 infanoj — membroj de la klubo, partoprenis la specialan infanan E-kurson, organizitan en IEK — Pisanica.

Plej grava tasko en la programo de la klubo estas lernado kaj perfektigo de la Internacia Lingvo kiel rimedo por kultura manifestiĝo kaj komunikiĝo kun apartaj infanoj-esperantistoj kaj kun similaj kluboj en la mondo. La geklubanoj lernas Esperanton du horojn ĉiusemajne sub la gvidado de la sperta instruistino L. Mladenova. La okupojn laŭ intereso kaj la perfektigon en la respektiva arto oni realigas sub la gvidado de specialistoj-pedagogoj el la lernejoj en Kolarov-subdistrikto.

La organizadon de la kluba agado kaj de la kulturaj manifestiĝoj la estraro de la Junpionira Domo komisiis al du klubgvidantoj — profesiaj pedagogoj.

Nun klubo „Standardo de la Paco“ havas 20 individuajn membrojn. La iluziista grupo ĉelegosocieto „Stilian Peŝev“ kaj la infana E-horo ĉe 58-a elementa lernejo estas kolektivaj membroj de la klubo. En la kulturaj iniciatoj de la klubo partoprenas ankaŭ la plej junaj esperantistoj en Kolarov-subdistrikto — la infanoj el 152-a baza tuttaga infanĝardeno kun gvidantino M. Manolova.

La sofia E-publiko jam konatiĝis kun la unuaj manifestiĝoj de la klubo. La 25-an de majo ĉi-jare en la salono sur str. Serdika 13, kiel unu el la programoj de la Semajno de E-Kulturo en Sofio, estis aranĝita Ekspozicio de pentraĵoj de infanoj-esperantistoj, membroj de la klubo.

La 30-an de majo en la sama salono la geklubanoj prezentis malgrandan programon dediĉitan al la herooj, pereintaj por la libero de la bulgara popolo kaj al la Tago de Infanoj — 1-a de junio. La geknaboj kantis kaj deklamis siajn versaĵojn en Esperanto. La iluziista grupo plezurigis la publikon per malgranda, sed interesa programo.

Antaŭstaras pliaj renkontiĝoj kun la geklubanoj el klubo „Standardo de la Paco“, sed ĉefa celo de la infanoj estas serioza kaj diligenta sinpreparo por partopreno en la antaŭstaranta internacia Infana Asembleo „Standardo de la Paco“, kiu okazos en Sofio en 1985.

Ni bondeziru al ili sukceson!

Inĝ. IVAN PACOV

INFANOJ PENTRAS KAJ LERNAS ESPERANTON

La infanoj el 152-a Tuttaga Infanĝardeno en la Sofia Kolarov-subdistrikto kun intereso kaj granda deziro atendas la lecionojn de Esperanto. Pruvo pri tio estas la brilantaj infanaj okuloj kaj ridetantaj vizaĝoj. Lastatempe mi altiris la atenton de la infanoj, kiuj lernas

Esperanton, al la pentrado. Mia celo estas stimuli la formadon de estetika gusto kaj kreoaktiveco ĉe ili.

En majo de la k. j. sub la aŭspicio de legosocieto „St. Peŝev“, en la korto de la Centro por Profesia kaj Scienca Agado en Kolarov-

subdistrikto oni okazigis pentradon sur asfalto per kolora kreto pri temo: „Feliĉa infaneco“. La infanoj el nia E-grupo sin prezentis tre bone — en siaj pentraĵoj ili prezentis la infanojn en la mondo, flirtigis siajn E-flaĝojn.

Du el la infanoj estis premiitaj kaj du aliaj ricevis kuraĝigajn premiojn.

Mi disponigis al la infanoj paŝtelojn, akvo-farbojn. Post anticipa preparlaboro — prelego, legado de belarta literaturo, projekciado de diapozitivoj — la infanoj sukcesis kontentige, iuj eĉ tre bone pentri infanan figuron, transdonante la ĝojan infanhumoron. En ĉiu in-

fanpentraĵo ĉeestis la verda E-flaĝeto, kiun la infanoj pentris kun deziro, ĉar ili scias, ke tio estas la standardo de paco kaj amikeco inter la popoloj.

La infanoj pentris diligente, sciante ke ili preparas pentraĵojn por ekspozicio prezentota en la klubejo de la Kulturcentro „M. Gorkij“ en Sofio, kiu estis malfermita dum la ĉi-jaraj Tagoj de E-kulturo. En tiu salono antaŭ tio ili jam dufoje prezentis koncertojn.

La etaj esperantistoj-pentristoj promesas sin prezenti ĉe la sekvanta ekspozicio per ankoraŭ pli belaj pentraĵoj.

MARIA MANOLOVA

ĈE POLAJ AMIKOJ



Solena inaŭguro de la Kongreso

De la 18-a ĝis la 25-a de aŭgusto 1984 en la malnova pola urbo Szczecin ĉe Balta Maro okazis la 22-a Kongreso de Polaj Esperantistoj, kiun partoprenis ĉirkaŭ 300 esperantistoj el Pollando kaj 33 fremdlandaj gastoj el 13 landoj.

La solena inaŭguro okazis en la rekonstruita kastelo de pomeraniaj princoj.

En sia parolado la prezidanto de Pola Esperanto-Asocio (PEA) d-ro Jerzy Leyk skizis la aktivadon de la polaj esperantistoj ĝenerale, kaj de la apartaj landaj filioj de PEA dum la periodo post la kongreso en Lodz en 1982, substrekte la ĝojigan fakton, ke la movado plivigliĝas kaj plijuniĝas, favore subtenata de ŝtataj aŭtoritataj instancoj.

Eminentuloj el diversaj ŝtataj kaj sociaj institucioj en Szczecin salutis la kongreson kaj bondeziris prosperon kaj fruktodonan laboron al la polaj esperantistoj, kies nobla aktivado kontribuas por la internacia paca interkompreniĝo.

Salutparolis ankaŭ multaj eksterlandaj gastoj, inter ili ankaŭ la reprezentanto de Bulgara Esperantista Asocio Dončo Hitrov, ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“. En la nomo de BEA li prezentis al la Estraro de PEA

memordonacon — simbolon de frata kunlaboro kaj aktivado pere de la Internacia Lingvo.

Kongresanoj kaj gastoj metis florkronojn antaŭ la impona belega monumento „Faro de Poloj“ en la centra urba parko.

La 22-a kongreso de PEA en Szczecin daŭris tutan semajnon, sed la kongresaj tagoj pasis rapide kaj kvazaŭ nerimarkite pro la streĉita afereca kaj riĉa je amuzaraĝoj programo.


Diversaj fakaj sekcioj de PEA — medicinistoj, instruistoj, ĵurnalistoj, turistoj okazigis apartajn kunsidojn, pritraktante sian aktivadon. D-ro Krause el GDR prelegis pri lingvaj problemoj lige kun Esperanto kaj la redaktoro de Radio Polonia Andrzej Pettyn gvidis koncizan praktikan kurson de Esperanto. Apartaj prelegoj kaj seminarioj pliriĉigis la aferrecan programon. Estis projekciitaj diversaj filmoj sonigitaj en Esperanto. La kongresanoj ĝuis du interesajn spektaklojn — de mallongaj satiroj de E-teatra trupo „Tespa“ el Parizo kaj programerojn de studenta Ensemblo „Pantomima“, artan-muzikan programon de la infana grupo „Etaj Mazuretoj“ el urbo Elk. Por pliriĉigo kaj variigo de la kongresa programo multe kontribuis la du tuttagaj ekskursoj en la regiono de Szczecin. Kongresanoj kaj gastoj ŝipveturis en la haveno de Szczecin kaj per luk-saj aŭtobusoj vizitis multajn urbojn, vilaĝojn kaj vidindaĵojn en la regiono, ligitajn kun la multjarcenta historio de Pollando kaj kun la sangaj bataloj por la liberigo de la lando elsub la jugo de la hitler-faŝistaj invadintoj. Spertaj ĉiĉeronoj klarigadis en Esperanto la vidindaĵojn dum la ekskursoj.

La prezidanto de PEA kaj aliaj funkciuloj de la E-movado en Pollando esprimis sian kontentecon pro la intimaj kaj aktivaj kontaktoj inter polaj kaj bulgaraj esperantistoj kaj sian sinceran deziron pri ilia ĉiufanka plifirmigo.

Szczecin — Sofio,
aŭgusto, 1984

D. SIMEONOV

MODELA ĈIĈERONO



S-ro Stanisław Gonczaruk antaŭ de li mem preparita mapo de ekskursitineroj laŭ la 15-a meridiano

Grupo da eksterlandaj gastoj de la ĉi-jara 22-a kongreso de Pola Esperanto-Asocio estis forveturanta al tuttaga ekskurso tra la regiono de Szczecin.

Ce la pordo de la granda luksa aŭtobuso staris mezaĝa altstatura ridetanta homo, kiu diskonis al la ekskursantoj de li mem preparitan mapon, sur kiu estis ĝuste fiksita la itinero de la ekskurso kaj estis algluitaj eltranĉaĵoj de koloraj bildkartoj, prezentantaj la dumvojajn vidindaĵojn. Prikontrolinte la ĉeeston de la ekskursantoj, kun la nomaro enmane, li ĝentile petis la ŝoforon ekveturigi la aŭtobuson. Poste li instalas sin sur la komfortan sidlokon apud la ŝoforo, prenis la mikrofonon de la laŭtparolilo kaj... la ekskurso komenciĝis.

Dum la tuta tago nia ĉiĉerono en bonega Esperanto rakontis la historion de Szczecin-regiono — de la antikveco ĝis nun, superŝutadis nin per abundaj informoj pri ĉiu loĝloko, pri ties vidindaĵoj, loĝantaro, vivtenado, pri la eventoj kaj personecoj, ligitaj kun ĝia historio. Li preterlasis eĉ ne unu preĝejon, monumenton, memortabulon, rakontante detalaĵojn pri iliaj konstruantoj, pri la epoko ĝenerale ktp. Dumvoje li ofte kantis esperantajn kaj polajn kantojn per sia agrabla baritonvoĉo, rakontadis anekdotojn. . .

Kvankam ni traveturis pli ol tricent kilometrojn dum unu tago, ofte elaŭtobusiĝante kaj

piedirante, ni preskaŭ ne rimarkis kiel rapide vesperiĝis kaj ni revenis en Szczecin, plenaj de impresoj, eble lacaj, sed ege kontentaj pri tiu mirinda ekskurso.

Sed, kiu fakte estis tiu ĝentila, simpatia, tiom riĉe informita, bonege posedanta Esperanton ĉiĉerono?

Lia nomo estas **Stanisław Gonczaruk** kaj li oficiale laboras en la Vojevodio (distrikta) Fako pri Domkonstruado ĉe la Vojevodio Popola Konsilantaro en Szczecin. La taskojn de ĉiĉerono li plenumas libervole, tamen li estas la „dojeno“ de la turismaj gvidantoj ĉe Pola Turisma Landkoniga Societo (PTTK) en sia urbo.

Dum nia ekskurso mi profitis mallongan ripozon sub libera ĉielo kaj alparolis lin.

— *Vi estas por mi modelo de ĉiĉerono kaj de bonega esperantisto! Bonvolu rakonti koncize pri Vi mem.*

— Mi estas esperantisto ekde 1956 kaj ĉiĉerono en pola lingvo kaj en Esperanto mi fariĝis depost 1962. Ĝis tiu jaro mi aktivis en sportaj kluboj: kajak- kaj jahtkluboj. Kvinfoje mia kvarpersona skipo gajnis la ĉampionecon de Pollando en kajak- kaj velkonkuroj. Mi multe fieras pro la tri de mi mem preparitaj memortabuloj pri la 15-a meridiano, trapasanta nian regionon, omaĝe al la 500-jara naskiĝtago de la mondfama pola astronomo Nikolao Kopernik. Tiel mi sukcesis ekinteresi pri Esperanto multajn landajn kaj eksterlandajn turistojn. En 1964 mi gvidis E-kurson sur la paĝoj de nia vojevodio gazeto „Kurier Szczeciński“, kiu aperigis 33 lecionojn. La kurso havis multajn korespondajn lernantojn, kun kiuj mi poste renkontiĝis en nia Esperanto-klubejo dum kontrolo ekzameno.

— *Cu Vi havas iujn profitojn de via socia laboro?*

— Ni ne parolu pri profito, sed pri elspezo de miaj propraj monrimedoj. Tamen tio donas al mi kontentigon pro la farita laboro por ĝenerala bono kaj edukado de junaj nuntempaj generacioj. Verdire mia karaktero ne permesas al mi sidi trankvile kaj indifere. El vidpunkto de polo kaj ankaŭ de bona mastro, mi deziras, ke niaj civitanoj vivu per atingajoj kaj penoj por plibonigado de la vivo de ĉiuj popoloj. Se mi kontribuos iel ĉi-rilate, tio estos la plej granda rekompenco por mi. Bonvolu saluti la bulgarajn esperantistojn. Transdonu al viaj kolegoj miajn plej korajn bondezirojn kaj mian admiron pri la ĉarma lando Bulgario!

Szczecin — Sofio,
aŭgusto, 1984

DONČO ĤITROV

BILDRAKONTOJ EL HUNGARIO

En daŭro de kvin jaroj Hungara Esperanto-Asocio sukcesis eldoni kvin bildrakontojn: „La Filoj de la Stonkora Homo“ de M. Jókai, „Steloj de Eger“ de G. Gardonyi, „La Faraono“ de B. Prus, „La aventuroj de Tom Sawyer“ kaj „La Aventuroj de Huckleberry Finn“ de Mark Twain.

La bildrakontojn verkis Tibor Horváth. La esperantan tekston prizorgis Vilmos Benczik. Nur la esperantan tekston de „La Aventuroj de Huckleberry Finn“ faris Tibor Vaskó. La kovrilpaĝoj de la bildrakontoj entenas koloran fragmenton de la bildrakonto.

Komprenoble, sur kelkdek paĝoj oni ne povas aperigi ĉiujn epizodojn de la ampleksaj romanoj. Ili estas nur skeleto de la tutaj verkoj. Sed kiel tiaj, ili tamen konservas la atmosferon kaj la aromon, kreitaj de la famaj aŭtoroj. Krome, la ĉefa linio de la intrigo estas klara, tial la bildrakontojn povas ĝui ankaŭ tiuj, kiuj ne legis la aŭtentikajn verkojn.

Hungara Esperanto-Asocio estas unu el la plej elstaraj libroeldonistoj kaj disvendantoj en Esperanto. En la tre populara bildrakonta formo ĝi okupas firme la unuan lokon. La esperantistaro kredas, ke HEA ne cedos baldaŭ la akiritan pozicion rilate la bildrakonton. Ni la legantoj havas nur unu tre modestan taskon — subteni la klopodojn tiurilate per aĉeto de la aperantaj libroj.

Mi turnas min al Bulgara Esperantista Asocio kun propono same kontribui al la klopodoj pri eldonado de bildrakontoj en Esperanto, aperigante bildepizodojn el la vivo de niaj naciaj herooj Vasil Levski kaj Ĥristo Botev.

NIKOLA NIKOLOV

JAM APERIS...

„BULGARINO“, jara eldonaĵo de la Komitato de Bulgaraj Virinoj. Aperas en hispana, angla, franca, germana kaj Esperanto. Adreso de la redakcio: Bulgario, Sofio, bul. Patriarh Evtimij 82.

Karaj legantoj, ni proponas al via atento la novan kajeron de revuo „Bulgarino“ 1983.

Tiu bela, riĉe ilustrita kajero estas dediĉita al la bulgarino de la 80-aj jaroj. Temas pri egalrajteco de la bulgara virino en ĝia praktika realigo. Estas prezentita la profesia sorto de diversaj virinoj — lerneja direktorino, prezidantino de agrikultura mastrumo, sociagantino, sciencistino, prokurorino, du famaj poetoj... Do, tre varia spektro.

En la sama kajero oni povas trovi informojn pri pacaktivado de la virinoj en Bulgario kaj en alilando dum 1983, pri familiaj ripozoj en Bulgario, pri arkeologio, modo, sporto k.a.

Impresas, ke la pliparto de la artikoloj estas altnivelaj, plaĉe verkitaj de konataj spertaj ĵurnalistoj.

Antaŭ nelonge aperis „Almanako de Bulgaraj Esperantistoj“. Redaktis: Asen Grigorov. Eldonis: *Hungara Esperanto-Asocio*, Budapeŝto, 1984. Respondeca eldonanto: Tibor Vaskó. Respondeca redaktoro: Vilmos Benczik. En la almanako trovis lokon verkoj de membroj de la Literatura Rondo, gvidata de Asen Grigorov. Prezentitaj estas ankaŭ aliaj aŭtoroj.

„Internacia Ĵurnalistoj“ renovigita

Unu el la ĉefaj problemoj, traktitaj en la jarkunveno de la Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEJA), okazinta dum la 68-a UK de Esperanto en Budapeŝto (1983), estis la problemoj pri regula aperado, plibeligo de la eksteraĵoj kaj pliriĉigo de la enhavo de la asocia organo „Internacia Ĵurnalistoj“.

Ekde la komenco de 1984 „Internacia Ĵurnalistoj“ aperas regule ĉiun trian monaton en 20 paĝoj, sur bonkvalita papero. Ĝi havas belaspektan modernan kovrilon kaj enhavas multajn interesajn materialojn pri ĵurnalistmaj problemoj, ĵurnalista etiko, plej gravaj taskoj de la kolegaro lige kun la 100-jara jubileo de Esperanto, protektado de la naturmedio kaj nobla ĵurnalista laboro por defendo de la paco. Tiaj fakte estis la rekomendoj de la ĝenerala jarkunveno de TEJA kaj de ĝia frata E-organizaĵo — la Internacia Ligo de Esperantistoj Foto-Kino-Magnetofon-Amatoroj (ILEF).

En la jam aperintaj tri kajeroj de „Internacia Ĵurnalistoj“ oni trovos legindajn materialojn en jenaj rubrikoj: „Tra la amaskomunikiloj“, „El la scienco kaj la vivo“, „ILEF aktivadas“, „El nia faka sperto“, „Beletro kaj poezio“, „Humuro kaj satiro“, „Ricevitaj esperantaĵoj“, „El nia leterkesto“ kaj multaj aliaj. Kunlaborado kaj kontribuadoj fare de niaj kolegoj TEJA- kaj ILEF-membroj estas petataj.

La estraroj de TEJA kaj ILEF kaj la redakcio de nia presorgano „Internacia Ĵurnalistoj“ atendas vian pli regulan kaj pli vigan kunlaboradon!

Ĉu la akademio ne povas direkti?

En sia artikolo „La Akademio fronte al la Centjara Jubileo“ („Esperanto“, 1983, 11) la prezidanto de la Akademio, d-ro André Albault, interpretante artikolon 1-an de la Statuto de la Akademio, laŭ kiu la tasko de la Akademio „estas konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de la lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon“ konkludas:

„Ni memorigu, ke **kontroli** signifas, laŭ PIV: detale esplori, ĉu io estas tia, kia ĝi devas esti, kaj la vortaro aldonas: **kontroli** neniam havas la anglan sencon: regi, direkti. Jen gravega informo por ĝuste kompreni la statuton kaj la esencan taskon de la Akademio!

Cetere ja evidentas, ke se la Akademio ial aŭ iel forgesus aŭ ignorus la sencon de **kontroli** kaj emus direkti la evoluon, do tiam la vivo rapide rekonsciigus ĝin pri ĝiaj devoj. La motoro de la evoluo estas la uzado de la plej granda nombro. La Akademio devas teni la bremsan por eviti devojigon aŭ akcidenton“.

Ĉu estas vere, ke **kontroli** ne estas **direkti**?

Kontrolado supozigas ekziston de normo. La kontrolado ne nur, detale esploras, sed ankaŭ konstatas, ĉu la objekto de kontrolo konformas aŭ ne konformas al la normo. Kiam la farita kontrolo konstatas, ke la objekto de kontrolo ne konformas al la normo, tio estas per si mem direktado. La kontrolo montras la direkton, kiu devas esti sekvata por atingi al la celo, starigita de la normo. Do, la kontrolado implikas la direktadon.

Fakte d-ro Albault mem agnoskas tion asertante, ke „la Akademio devas teni la bremsan por eviti devojigon aŭ akcidenton“. Devojiĝo estas evitita, se la veturilo, elironta el la vojo, estas bremsita kaj direktita al la ĝusta vojo. Do, la „bremso“ estas per si mem direktado.

Se la Akademio „emus direkti la evoluon, do tiam la vivo rapide rekonsciigus ĝin pri ĝiaj devoj“. Vere, la vivo rekonsciigus ĝin, se ĝi ne estus bona direktanto. Sed se la Akademio pruvigus bona direktanto, okazus nenia „rekonsciigo“.

Tute prava estas la koncepto de d-ro Albault, ke „la motoro de la evoluo estas la uzado de la plej granda nombro“. Sed tiu ĉi „plej granda nombro“ devas esti helpata per kontrolado, t.e. direktado. Vere, la Akademio ne povas altrudi siajn direktivojn laŭ la maniero, laŭ

kiu povas esti altrudataj la juraj direktivoj. La direktivoj de la Akademio povas esti nur rekomendoj, kies forto estas en ilia argumenteco kaj konvinkeco. Sed tio ne senigas ilin je ilia karaktero de direktado, kio devas esti konsiderata kiel esenca tasko de la Akademio.

LJUBOMIR MIHAJLOV

PRI LA „INTERNA IDEO“ DE ESPERANTO

La esprimo „interna ideo“ estas taŭtologio. Ĉiuj ideoj estas „internaj“. Eksteraj ideoj ne ekzistas. La uzon de la esprimo „interna ideo“ pravigas nur stilistikaj konsideroj.

Ideojn havas nur la homoj, ne ties produktoj, malgraŭ, ke ofte oni parolas pri la **ideo** de tiu aŭ alia nova modelo de, ekzemple, aviadilo, aŭtomobilo, televidaparato ktp. Similaj esprimoj estas nur metonimio.

La lingvoj, neplanaj kaj planaj, estas homa produkto, do ili ne povas havi ideojn. Ideojn povas havi nur ties kreintoj kaj uzantoj.

Esperanto, kiel homa produkto, ne povas havi ideojn. Ideojn havis ĝia kreinto. Ideojn havis kaj havas ĝiaj uzantoj.

La ideoj de la kreinto de Esperanto estis noblaj, sed la nobleco de liaj ideoj ne eniris en la lingvon pro la simpla kialo, ke temas pri diverskategoriaj fenomenoj. La lingvo ne povas esti nobla aŭ malnobla. La lingvo kiel homa produkto aŭ pli konkrete kiel instrumento povas esti taŭga aŭ maltaŭga.

Ne nur nenian noblecon, sed entute nenian ideon la kreinto de Esperanto enigis en ĝin. Li tutsimple kreis taŭgan instrumenton por realigi siajn noblajn ideojn servi al la homaro.

Kiel la kreintoj, tiel ankaŭ la uzantoj de Esperanto ne enigis en ĝin noblecon, kiel ili ne povas enigi malnoblecon.

La adreso de la „interna ideo“ de Esperanto estas ne en la lingvo, sed en la konscio de la kreinto kaj de la uzantoj de Esperanto. La oftan intermiksadon de la du adresoj oni povas klarigi per la metonimiemo, faciligita de la fakto ke ne nur la aŭtoro de la Internacia Lingvo, sed ankaŭ la plejparto de ĝiaj uzantoj aplikis kaj aplikas la lingvon por noblaj celoj.

LJUBOMIR MIHAJLOV

PETER RADOS PRI SI MEM KAJ PRI IO ALIA...



Dum la tagoj de la Internacia Somera Esperanto-Universitato en Veliko Târnovo nia reprezentantino STEFKA ČENKOVA renkontiĝis kun s-ro PETER RADOS el Hungario kaj starigis al li kelkajn demandojn, kiujn li afable respondis.

— S-ro Rados, bonvolu prezenti vin!

— Mi esperantistiĝis en 1965. Mi estas instruisto de rusa kaj hungara lingvoj kaj literaturo. Nun mi laboras kiel lingva redaktoro de hungara ekonomia revuo. Kiel esperantisto ĝis nun mi okupiĝis pri tradukado de versajoj kaj prozo, artikolverkado — ĉefe kiel redaktano de „Hungara Vivo“. Ekde la jaro 1981 mi okupiĝas ankaŭ pri propaganda kaj instrua agado.

— Vi estas konata kiel unu el la kreantoj de la tiel nomita „pirata metodo“. Bonvolu klarigi ĝian esencon!

— Unue, eble estus dezirinde rimarki, ke la superintensa „pirata metodo“ elkreskis el la propaganda agado, ĉar evidentiĝis, ke ne sufiĉas nur paroli pri simpleco kaj rapida ellernado de Esperanto. Ja se oni, entuziasmiĝinte pri Esperanto, poste partoprenus kurson, kiu daŭras plurajn monatojn, eĉ jarojn, li aŭ ŝi povus senti sin trompita. Ni, kelkaj propagand-

distoj, komencis esplori kiom devas esti la minimuma daŭro de Esperanto-kurso kaj kiuj estas la plej taŭgaj metodoj de instruado. Laŭ iniciato de Jozefo Horváth, aŭtoro de la jam disvendita lernolibro „30 nap allat eszperantoul“ („Esperanto dum 30 tagoj“) ni decidis, ke la kurso devas daŭri 5 tagojn, ĉiutage oni devas instrui, respektive lerni po 10 horojn, krome ni devas uzi siaspecajn, eble iom strangajn por multaj metodojn. Ni multon ĉerpis el la sperto de la bulgara sugestopedia skolo, gvidata de profesoro Georgi Lozanov. Unue multajn kursojn ni eĉ nomis sugestopedijaj. Sed pro diversaj kialoj, precipe ĉar niaj vojoj jam ege disiĝis, ni rezignis pri tiu ĉi epiteto kaj ni parolas jam nur pri superintenseco aŭ nomas nian metodon „pirata“, foj-foje „piratfiŝa“ aŭ „fiŝpirata“. Kial? Ĉar min ne interesas la pedagogiaj superstiĉoj, nur la rezulto, kiun mi devas akiri, kompreneble, per humanaj metodoj. Tamen mian energion, celkonscion iuj konsideris „agresemo“. En tiu ĉi diskuto mi asertas, ke mi amas kaj estimas la homojn, sed mi ne kompatas ilin. La scienco konstatis: **homo sapiens** (la nuntempa homo) uzas nur 4 procentojn de siaj intelektaj kapabloj. Se mi per iuj metodoj instigas miajn lernantojn dum 5 tagoj eluzi eble 6—8 procentojn de tiuj kapabloj, do per tio mi povas fari „miraklojn“. Sed mirakloj ne ekzistas. Ekzistas nur la mirinda estaĵo — la **homo**, kiu povas multe pli ol oni ĝenerale imagas.

— Kiaj estas viaj impresoj pri la ĉi-jara sesio de ISEU?

— Laŭ mia opinio ĝi estis pli altnivela ol meza. Etose ĝi estis bonega, ĉar inter diversaciaj partoprenantoj regis la spirito de vera esperantismo. Bedaŭrinde, la lingva nivelo de multaj el la partoprenantoj tute ne estis kontentiga. Rilate la loĝejkondiĉojn kaj la priservadon en la manĝejo oni povas postuli ĉpli da zorgoj, ĉar temas pri internacia aranĝo kaj pri la prestiĝo de socialisma Bulgario. Du vortojn pri la ekskurso: prefere malpli da vidindaĵoj, sed pli da tempo por ili.

Mi esperas, ke estonte la sesioj de ISEU en Veliko Târnovo, surbaze de jam akirita sperto, estos ankoraŭ pli bone organizitaj, kun partopreno de pli granda nombro da alilandaj prelegantoj.

Veliko Târnovo,
julio, 1984

STEFKA ČENKOVA

JAPANIO — MALPROKSIMA KAJ PROKSIMA

Nia samlandanino VASJA CVETKOVA, multjara aktivulino de la bulgara esperantista movado, administra sekretario de Mondpaca Esperantista Movado (MEM) kaj sekretario de la Virina Komisiono ĉe BEA, vizitis Japanion laŭ invito de la Japania Pacdefenda Esperantista Asocio.

Dank' al la gastamo kaj afableco de siaj gastigantoj, Vasja Cvetkova traveturis Japanion, vizitis multajn mondfamajn vidindaĵojn, renkontiĝis kun japanaj esperantistoj en diversaj lokoj de la lando, prelegis pri Bulgario, pri la aktivado de la bulgaraj esperantistoj-pacdefendantoj, pri la agado de bulgara MEM.

Dum sia vizito en Japanio V. Cvetkova renkontiĝis kun eminentaj japanaj sociigantoj kaj ĵurnalistoj, kiuj montris viglan intereson pri Bulgario, pri la bulgara E-movado kaj pri la Bulgara MEM-sekcio. Rezulte de tiuj renkontiĝoj kaj interparoloj en diversaj japanaj gazetoj (esperantaj kaj neesperantaj) estis publikigitaj informoj, intervjuoj kun nia samlandanino kaj materialoj pri ŝia vizito. Ili atestas pri la granda utileco de tiu vizito — pro la senperaj kontaktoj kun japanaj civitanoj, al kiuj Vasja Cvetkova konigis nian socialisman landon, nian E-movadon.

Reveninte hejmen, Vasja Cvetkova verkis broŝureton pri ŝia vojaĝo tra Japanio. Fragmentojn el tiu verko ni publikigos en kelkaj sinsekvaj numeroj de „Bulgara Esperantisto“.



La 16-an de julio 1983 per aviadilo de „Aeroflot“ mi forflugis al Moskvo kaj Habarovsk kaj de tie — per luksa vagonaro al la sovetaj haveno Nahodka. De tie — al la japana haveno Jokohama per la sovetaj ŝipo „Habarovsk“.

Post dutaga ŝipveturado, la 1-an de aŭgusto en la tria horo posttagmeze, ni atingis Jokohama — unu el la plej grandaj japanaj havenoj ĉe la Pacifiko, apenaŭ videbla tra la maldensa nebulo. Pluvetis. Antaŭ ni elkreskis multnombraj diverskoloraj kaj diversdimensiaj ŝipoj kaj jaĥtoj, elkreskis arbaro el grupoj.

Post la doganformalaĵoj surŝipe, „Habarovsk“ jetis ankron en la havenon. Miaj okuloj soife serĉis Esperantan flagon. Jen finfine mi vidas ĝin! Grupo da esperantistoj el Jokohamo, inter kiuj ankaŭ infanoj, alten flirtigis la verdan flagon kaj gaje kaj amike svingis per manoj al mi. Inter ili estis la svelta kaj ĉarma prezidanto de Japania Pacdefenda Esperantista Asocio sinjoro Kurita Kimiaki, veninta el urbo Miŝima speciale por bonvenigi kaj akompani min dum mia vojaĝo tra Japanio. La renkontiĝo estis kortuŝa. Ĝi ege impresis miajn ŝipajn kunvojaĝantojn kaj ili montris viglan intereson pri Esperanto. Sed jen mi surpaŝis la kajon kaj baldaŭ estis meze de la japanaj esperantistoj. Unuaj neforgeseblaj minutoj de afabla akcepto, de konatiĝo! Radiantaj vizaĝoj, varmaj ridetoj. Kion plian mi povus deziri! Ni sidigis en la vasta kaj komforta salono de la havena atendejo. S-ro Kurita konatigis min detale pri la programo de mia vojaĝo, donis al mi diversajn materialojn kaj valorajn konsilojn.

Iom poste ni decidis vespermanĝi. Miaj gastigantoj proponis al mi agrablan restoracion en „eŭropa“ stilo. La japanaj amikoj tradukis al mi la menuon. Kiun el la manĝaĵoj mi elektu? Tipe japanan aŭ kontinentan? Post mallonga tempo la kelnero elegante prezentis al ni manĝaĵojn, metitajn por ĉiu sur speciala plecto. En malgranda, sed profunda terakota telero kun kovrilo troviĝis la tradicia rizo, kiun la japanoj manĝas anstataŭ panon. En alia profunda telero, ankaŭ el terakoto, estis la supo el algoj, en tria — la kruda fiŝo. Sur etaj teleretoj estis metitaj diversaj salatoj, soja saŭco kaj aliaj. Kaj apud ili kuŝis „Ĥaŝi“ — la japanaj vergetoj por manĝado. Min atendis nova elprovo. Ĉi-foje, tamen, mi rapide manifestis lertan konsideremon kaj pardonpetante, ĝentile esprimis mian deziron manĝi per kulero, forko kaj tranĉilo. Mi atentis pri la ordo, laŭ kiu ili konsumas la manĝaĵojn. Evidentiĝis, ke la japanoj konsumas la manĝaĵojn ne laŭvice, sed samtempe. Per la vergetoj ili tre lerte prenas rizon kaj alian manĝaĵon. Samtempe „Ĥaŝi“ plenumas la rolon ankaŭ de tranĉilo. Mi rimarkis kiel lerte la japanoj dispecigas la fiŝon kaj prenas ĝin. Mi gustumis unuafoje japanajn manĝaĵojn. Unuafoje mi manĝis krudan fiŝon kaj alĝan supon. Ili estis nekutimaj por mi. Kaj tamen mi montris kuraĝon kaj formanĝis la duonon de ĉiu manĝaĵo. Nur la prezentitan al mi oranĝan sukron mi fortrinkis je unu spiro ĝisfunde.

Post la vespermanĝo mi vizitis la Muzeon de la Maro, troviĝantan en turo. Por specialistoj ĉi tie estas vera paradizo — malnovaj kaj novaj modeloj de ŝipoj, boatoj, dekoj da modeloj de

maraj nodoj, de ŝipaj ŝnuroj, maraj ŝtonoj, konkoj k.a. De la plej alta etaĝo de la turo malkovriĝas belega panoramo al la urbo kaj la haveno. Post la interesa promeno en la turo ni faris malgrandan peraŭtobusan rondvojaĝon tra la alta parto de la urbo.

Vespere oni kondukis min en la Esperanto-klubon, kie mi devis prelegi pri la bulgara E-movado kaj pri la Internacia Esperanto-Kursejo. Ĉiuj senŝuigis kaj lasis siajn ŝuojn en la antaŭĉambro. Tio estas malnova tradicio en Japanio, kiun oni gardas ankaŭ nun. Tamen mi ankaŭ sekvis ilian ekzemplon, kvankam tio estis tute nekutima por mi. La planko estis kovrita per molaj rizaj matoj — „tatamoj“, tio estas specialaj japanaj plankkovriloj. Ili estas multekostaj, kiel mi komprenis. Pro tio la japanoj ne iras en ŝuoj sur ili kaj tiel la „tatamoj“ havas pli longan vivon. Tamen ne en ĉiuj publikaj lokoj oni demetas la ŝuojn. Tio okazas nur tie, kie la planko estas kovrita per „tatamoj“.

En la klubejo jam estis kolektiĝintaj esperantistoj el la urbo. Sur nigra tabulo estis skribitaj mia nomo kaj la postenoj, kiujn mi okupas en Mondpaca Esperantista Movado kaj en la Virina Komisiono ĉe BEA. Min kaptis ioma maltrankvilo. La samideanoj salutis min per riverencoj de estimo kaj ridetoj ekbrilis sur iliaj vizaĝoj. Al la serena saluto mi respondis elkore. Mia rigardo rapide glitis tra la ĉambro kaj kaptis la neordinaran aranĝon. En la mezo — longa malalta tablo kun tre malaltaj piedetoj. Mankis seĝoj. Anstataŭ ili — grandaj kvadrataj molaj kusenoj. Oni invitis min sidigi sur unu el ili, en la centro, sur la honoran lokon. Mi petis pardonon kaj elektis lokon en angulo, kie ne estis aerfluo. Milda japanino afable proponis al mi teon „nihonĉa“ kaj diversajn dolĉaĵojn.

S-ro Kurita prezentis min al la ĉeestantoj. Oni aŭskultis kun vigla intereso la prelegon

pri la Esperanto-movado ĉe ni, pri Bulgario. Fine mi projekciis lumbildojn pri nia lando. Fortan impreson faris al ili la fakto, ke Esperanto ĝuas popularecon en malgranda Bulgario kaj ke nia agado estas subvenciata de la ŝtato, ke por la bezonoj de la bulgaraj kaj eksterlandaj esperantistoj estas konstruita Internacia Esperanto-Kursejo, kie ĉiujare oni organizas Esperanto-kursojn, seminariojn, simpoziojn ktp. En Japanio la esperantistoj mem subvencias sian agadon. Ili tuj rimarkis la diferencon kaj admiris niajn atingojn. Mi povis konstati, ke ĉiuj estis forte impresitaj.

Oni enloĝigis min ĉe la Esperanta familio Doi — tre inteligenta kaj progresema familio, kun kvar infanoj. Ĉiuj estis tre gentilaj al mi. La geedzoj tre bone posedas Esperanton kaj ni konversaciis diverse. S-ro Doi gvidas modernan forestan kurson de Esperanto kaj entuziasme parolas pri ĝi. La familio loĝas en nova koketa duetaĝa domo kun ĝardeneto. La ĉambroj estas malgrandaj kaj la loĝantoj ordinare dormas sur oportunaj matracoj, kiujn oni metas vespere sur plankon. Miaj dormastroj disponigis al mi ĉambron kun lito — tio estis kortuŝa.

La sekvantan tagon, akompanate de s-ro Kurita, mi vizitis la antikvan urbon Kamakura, unu el la plej malnovaj en Japanio. La urbo estis tre hejmeca — malgrandaj, puraj stratoj, malnovaj belaj domoj, budaistaj temploj kaj ŝintoistaj sanktejoj. Ni vizitis la budaistan templon „La Granda Buddo“, en kies korto grandega statuo de Buddo en majsesta sidanta pozo akceptas ĉiutage milojn da vizitantoj. Oni diras, ke tio estas la plej granda Buddo sub libera ĉielo en Japanio. La ĉarmaj floroj, bone ordigitaj arbustoj kaj arboj donas apartan ĉarmon al tiu subĉiela templo. Poste ni vizitis ŝintoistan sanktejon kaj fariĝis nevolaj spektantoj de esziĝfesto kaj baptoceremonio.

(Daŭrigota)

RENKONTIGO DE TRI ESPERANTISTAJ GENERACIOJ

En la antaŭtago de la 40-a jubileo de la socialisma revolucio je la 9-a de Septembro 1944 la Kulturcentro „M. Gorkij“ ĉe la Urba Estraro de BEA en Sofio organizis en la klubejo sur str. Serdika 13 renkontiĝon de tri esperantistaj generacioj. La rememoroj de la batalantoj kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo kaj de la veteranoj-esperantistoj transportis la ĉeestantojn en la streĉitajn jarojn de armita batalo en la periodo 1941—1944, kiam pro siaj progresemaj ideoj la homoj estis mortigataj sen juĝo kaj verdikto; kiam por la monarko-faŝistaj regantoj Esperanto estis simbolo de la progresema kaj demokratia homa penso; kiam en la nomo de la popolo, por la ideoj kaj la

faro de la partio komunistoj, komsomolanoj, ĉiuj antifaŝistoj endanĝerigis sian vivon kaj suferis ĉiajn mankojn — en la vicoj de partizantaĉmentoj kaj batalgrupoj, en malliberejoj kaj koncentrejoj.

Per unuminuta silento la ĉeestantoj esprimis sian estimon al la memoro de la pereintoj por la helaj idealoj de estonta vivo, pri kiu la poeto-revoluciulo Nikola Vapcarov verkis sian versaĵon „Blanka printempo“.

La eksa partizano, la Heroo de Socialisma Laboro kaj prezidanto de CE de BEA Hristo Gorov faris mallongan revuon de la bataloj de la partio kontraŭ la kapitalismo kaj faŝismo — de la Septembra Ribelo en 1923 ĝis la 9-a de

Septembro 1944, rakontante ankaŭ pri la agado de la progresemaj esperantistaj organizaĵoj dum tiu periodo.

Per sia sincera rakonto la atenton de la aŭskultantoj kaptis ankaŭ la iama politika malliberulino Ivanka Spasova — nun prezidantino de la E-societo en Bankja. Si parolis pri la decidiga rolo de la Internacia Lingvo por formado de ŝia idea mondkoncepto, por ŝia elkresko kiel komunisto.

Interesan fakton el la historio de la E-movado rakontis Krâstju Karucin — eksa politika malliberulo kaj koncentrejano, nun sekretario de la Bulgara E-Muzeo. „Dum la Lejpciga proceso — li rakontis — esperantistoj el Stara Zagora ricevadis per siaj korespondantoj en Francio gazeton „L'Humanite“. Ni tradukis artikolojn, dediĉitajn al la heroo konduco de Georgi Dimitrov antaŭ la faŝista tribunalo kaj sendis ilin al la redaktoro de gazeto „Vik“ („Krio“) — Todor Genov en Sofio, kiu publikigis ilin. Tiamaniere la bulgara publiko eksciis la veron pri la proceso, kaŝitan malantaŭ la mensogoj de la bulgara burĝa gazetaro“.

Emociaj estis la rememoroj de la eksa koncentrejano, la vic-prezidanto de la Urba Estraro de BEA en Sofio Haim Levi. En sia rakonto li revenis en julio 1944, kiam en la koncentrejo apud Pleven la faŝistoj provis bruligi 150 hebreejn.

Cvetan Maksimov parolis pri sia kontraŭfaŝista agado en la Egea regiono, kaj Ivan Peev — eksa politika malliberulo kaj koncentrejano, partopreninto en la Patrolanda kaj la Dua Mondmilito, per sia eldiro donis bonan finon de la renkontiĝo: „Esperanto estas lingvo de la progresemaj homoj. Mi ne konas esperantistojn-reakciulojn. Samideanojn mi renkontis kaj en la malliberejo, kaj en la koncentrejo. Esperanto estis kaj estos!“

Per kantoj kaj versaĵoj salutis la ĉeestantajn batalantojn kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo Maria Angelova, Stefka Kalimenova, la infana E-grupo el Bankja, Krâstina Dimitrova, Nikolaj Mladenov, Bojanka Cvetkova, Anelia Sotirova, d-ro Kardaŝev, Nevjana Krâsteva, Miĥail Zdravev kaj grupo da mezlernejanoj el Sofio.

MARIA JANKOVA-BOJAĜIEVA

NI KONDOLENCAS

FORPISIS LJUDMILA PASPALLEEVA

En majo j. k. forpasis Ljudmila Paspaleeva. Ŝia vivo estis ne tre longa, tamen sencplena. Tre bone ŝi laboris kiel redaktorino en la emisio por infanoj de Radio Sofio.

Sukcese kaj entuziasme ŝi laboris ankaŭ por Esperanto. Antaŭ jaroj ŝi estis kasistino de la ĵus fondita societo de esperantistoj-filologoj en Bulgario.

Si havis korespondantojn en diversaj landoj. Estante filino de nia konata porinfana verkistino Vesa Paspaleeva, Ljudmila ankaŭ verkis (ofte por infanoj), tradukis, skribis recenzojn.

De tempo al tempo ŝi kunlaboris al „Bulgara Esperantisto“.

Ni memoru ŝin — ĉarma, kultura, humana — tia, kia ŝi estis en la jaroj de kreado kaj sukceso — en siaj plej belaj jaroj!

La 10 -an de julio k. j. forpasis

DIMITAR ALEKSIEV
(1908—1984)

el v. Zafiari Stojanovo, E-veterano, multjara membro kaj aktivulo de E-societo „Homeco“ — Popovo.

Aktiva kaj sindona esperantisto, li estis animo de la E-grupo en sia vilaĝo. En 1980 la Centra Estraro de BEA distingis lin per ora insigno.

Niajn elkorajn kondolencojn al E-societo „Homeco“ — Popovo kaj al liaj parencoj.

La 4-an de junio k. j. subite forpasis

ILIJA PETPOV
(1912—1984)

E-veterano, eksinstruisto de okcidentaj lingvoj kaj de Esperanto en Popovo, fervora kaj sperta lingvisto.

En 1980 la Centra Estraro de BEA distingis lin per ora insigno.

Al la membroj de E-societo „Homeco“ — Popovo, kaj al lia edzino Frederika — niajn elkorajn kondolencojn.

El Kazanlâk oni sciigis al ni, ke la 11-an de julio 1984 forpasis la 76-jara

ĤRISTO KURUMILEV

Antifaŝisto kaj konstruanto de la nova socialisma vivo, li restos en la memoro de la esperantistoj el urbo Kazanlâk kaj Ŝipka kiel sindona aktivulo de nia nobla movado kaj inspirita deklamanto de E-poezio.

Al lia edzino Ana kaj al ĉiuj, kiuj amis kaj estimis lin, ni esprimas niajn sincerajn kondolencojn!

En Sofio subite forpasis en sia 79-jara aĝo la E-veterano

STAJKO PISAROV

En la historio de la bulgara E-movado li restos kiel unu el la fondintoj de la Bulgara Esperantista Fervojista Sekcio.

Al la parencoj de Stajko Pisarov niajn profundajn kondolencojn!

En novembro k.j. finiĝos unu jaro post la morto de la flama esperantisto kaj turistoj

KOSTADIN GEORGIEV ĈIĈANOV

Naskita en 1907 en Plovdiv, li estis esperantisto ekde 1926. Ĉiĉanov estis multjara aktivulo kaj prezidanto de la E-societo en Plovdiv, senlaca organizanto de kursoj kaj lektoro de Esperanto. Pli ol 3 jarojn li pasigis en faŝistaj malliberejoj pro sia progresema esperantista agado.

Estu eterna lia memoro!

LA REDAKCIO



DEZIRAS KORESPONDI

ARGENTINO

Ramon Astrada—est. 7, Malviwas Argentinas 1475, 5900 Villa-Maria (bba)—kun bulgaraj geamikoj pri ĉt.

BULGARIO

Ivan Nikolov (19-jara ekonomiisto) — 5250 Svištov, „Ekzarĥ Josif“ 7, p. k. 2. — kun ĉl pri ĉt.

ĈEĤOSLOVAKIO

F-ino Lenka Kusková (17-jara lernantino de gimnazio) — Pod Lipou 1665, 508 01 Horice—pri skiado, vojaĝado, interŝanĝo de BK.

F-ino Irena Jirásková (24-jara instruistino en popollernejo) — 54 233 Rtynev Podkrkonoši 647—pri pentrado, desegnado, sporto, kolektado de infanpentraĵoj.

HUNGARIO

Pákozay Statalin (12-jara lernantino) — Budapest XII kev., Fodor u. 123, II24—kun ĝelernantoj.
Unger Diana (16-jara knabino) — Pécs, Damjanich u. 11, 7624 — kun junaj bulgaroj.

JUGOSLAVIO

Antonić Zorica (17-jara) — Slavinovići 40, oste Lazarevića, 75 000 Tuzla.

Bragišić Gorjana (18-jara) — II Krajiške Brigade 40, 77 000 Bihać.

Zita Ladanyi (14-jara knabino) — YU — 24420 Kanjiza, Karadjordeva 11 — kun 13-15 jaraj ĝekomencantoj.

POLLANDO

Mariola Barzicka (15-jara lernantino) — 27-600 Sandomierz, str. „Rynek“ 28 (d) 3 — kun ĝejunuloj, interŝ. BK kaj PM.

Barbara Mukutowska (36-jara) — 67-100 Nowa-Sól, Matejki 20 F/7 S — kun bulgaroj pri muziko, turismo, teatro, literaturo, sporto, koloraj BK kaj PM.

Grazyna Mirkiewicz (24-jara kemiistino) — 50-501 Wrocław, ul. Hubska II9/34 — pri turismo, Esperanto-movado, fotografado.

Hanna Maselkowska (25-jara) — ul. „Świeciechowska“ 2/4, Pl 64 100 LESZNO.

Andreo Szczudło — Górczyna, PL 67 407, Szlichtyn-gowa.

Wojciech Grochowski (26-jara) — OI-184 Warszawa, ul. Wawelberga 3m 185 — pri sporto, turismo, muziko, Esperanto, angla lingvo, literaturo, fotografio.

EN HAVO

ST. ĈENKOVA. Dua sesio de ISEU'84	II
M. BACEV. Ĉe la sojlo de la nova lernoĵaro	1
ĤR. MEDNIKAROV. Kun patrio en la kor'	3
M. TAŠEVA. Bulgaroj en Vankuvero	4,5
ST. DIMITROVA. 40-a TEJO-kongreso en Swanwick5,6	
D. SIMEONOV. Ĉe polaj amikoj	9
D. HITROV. Modela ĉiĉerono	10
* * * Ni recenzas	11
L. MIĤAJLOV. Ĉu la Akademio ne povas direkti?	12
V. CVETKOVA. Japanio — malproksima kaj proksima	14,15
* * * Enlanda movado	16
KR. KARUCIN. Tra la gazetaro	III
* * * Deziras korespondi	III
* * * Verdaĵ steletoj	IV

TRA LA GAZETARO

En Sofio:

Jurnalo „Rabotniĉesko Delo“ (19.VIII. 1984) aperigis skizon pri la centjarulino avino Gurĝa Maĝarska el v. Vladimir, distrikto de Pernik, patrino de kvin partizanoj. Oni mencias, ke lia plej aĝa filo Aleksandâr, pereinta en la batalo, estis esperantisto. J. „Veĉerni Novini“ (18. VIII. 1984) donis lokon al artikolo „La lingvo de la homaro post cent jaroj“ de Stanko Nacev, pritraktanta la problemon pri la ebloj de unueca lingvo en estonto. La aŭtoro esprimas tre favoran opinion pri Esperanto en la nuna tempo.

En la provinco:

Jurnalo „Sumenska Zarja“ — u. Sumen (3. VII. 1984) informas pri gastado en u. Sumen de sovetia esperantisto el la urbo-heroo Brest. La sama ĵurnalo (18. VII. 1984) detale informas pri malfermita letero de la Distrikta Estraro de BEA kaj la Distrikta Komitato por Paco en u. Sumen al la tutmonda esperantistaro. Ambaŭ informojn preparis Cvjatko Todorov. J. „Borba“ — u. Veliko Târnovo (4. VIII. 1984) aperigis ampleksan intervjuon kun s-ino Maria Pontika, prezidantino de la Helena Esperanto-Asocio, kiu prelegis en la Somera Esperanto-Universitato en Veliko Târnovo. La intervjuon prenis Olga Cankova.

Sur la unua kovrilpaĝo: la maljuna Esperanto-aktivulo Danail Ivanov en sia tranĉillaborejo en la arkitektura rezervejo „Etâr“ apud Gabrovo. Surskribo „Esperanto parolata“ sur la pordo de la laborejo altiras la atenton de la multnombraj vizitantoj.

Ĉefredaktoro: Donĉo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BACEV, Vasil BOROVIANSKI, Radoslav DOJĈINOV, prof. d-ro Kiril POPOV, Dimitâr ĤAGIEV, Krâstju KARUCIN.

Administranto — Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Ĉirilo kaj Metodjo“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

tel. 31-70-19

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

P. K. 66

1 000 Sofio



RAN BOSILEK

MERLO-PERLO

Merlo-Perlo faris al si nesteton, demetis ovojn. Alvenis sub la nesto Baptino-Vulpino kaj diris:

— Merlo-Perlo, donu al mi oveton! Miaj gepatroj gastas al mi. Supon mi volas kuiri al ili.

La Merlo donis al ŝi oveton.

La sekvan tagon Baptino-Vulpino ree alvenis kaj diris:

— Merlo-Perlo, donu al mi oveton! Al mi gastas fraĉjo kaj franjo.

La Merlo denove donis al ŝi.

Hodiaŭ oveto por tiu, morgaŭ por alia — restis al la Merlo nur unu oveto.

Venis denove Baptino-Vulpino kaj diras:

— Merlo-Perlo, donu al mi oveton:

— Mi ne havas, kara Vulpino! — respondis la Merlo.

— Se vi ne havas — vin mi formanĝos!

Ekploris la Merlo. La lastan oveton ĝi donis.

La sekvan matenon pasis hundo tra la arbaro. Ĝi vidis la plorantan Merlon kaj demandis:

— Kial vi ploras, Merlo-Perlo?

— Ĉu mi povas ne plori, hundeto? Ĉiun matenon venas Baptino-Vulpino kaj prenas de mi po unu oveton. Ŝi prenis ĉiujn miajn ovetojn. Nun ŝi denove venos. Mi ne plu havas kion doni al ŝi. Kaj ŝi min formanĝos.

— Ne ploru, Merlo-Perlo! Mi kaŝos min jen ĉi tie en la densejo. Kiam venos Baptino Vulpino por peti ovon, vi diru al ŝi: „Mi ne havas ovon, Vulpineto. Sed jen tie en la densejo estas kokineto. Prenu ĝin!“

La hundo kaŝis sin en la densejo. Alvenis Baptino—Vulpino kaj diris:

— Merlo-Perlo, donu al mi oveton!

— Mi ne havas oveton, Vulpineto! Mi havas kokineton, jen tie en la densejo. Se vi volas, prenu ĝin.

Ekĝojis Baptino-Vulpino kaj komencis fosserĉi en la densejo. La hundo elsaltis kaj postkuris ŝin.

Ŝi kuras, ĝi postkuras ŝin, ŝi kuras, ĝi postkuras ŝin, ŝi kuras, ĝi postkuras ŝin — finfine ŝi atingis sian truon kaj kaŝiĝis.

La hundo alvenis antaŭ la truo. Ĝi atendis a eliron de Baptino-Vulpino por kapti ŝin

je la kolo. Baptino-Vulpino ne sciis, ke la hundo atendas ekstere kaj demandis siajn krurojn:

— Nu, diru al mi kruretoj, kion vi parolis, kiam la hundo postkuris vin?

— Kuru, Vulpineto, ni kune kuru! Kuru, Vulpineto, ni kune kuru!

— Karaj miaj kruretoj, franjo aĉetos al vi baŭŝetojn. . .

— Kaj vi, okuletoj, kion vi parolis?

— Kuru, Vulpineto, ni kune kuru! Kuru Vulpineto, ni kune kuru!

— Karaj miaj okuletoj, franjo aĉetos al vi okulvitretojn. . .

— Kaj vi, oreletoj, kion vi parolis?

— Ankaŭ ni tiel parolis: „Kuru Vulpineto, ni kune kuru!“

— Karaj miaj oreletoj, franjo aĉetos al vi orelingetojn. . .

— Kaj vi, vosteto mia, kion vi parolis?

— Hundo, kaptu la Vulpineton je la vosto, hundo, kaptu la Vulpineton je la vosto!

— Ĉu tiel!? Nu bone, mi donos vin al la hundo, por ke ĝi formangu vin! Kaj Baptino-Vulpino eligis sian voston eksteren.

La hundo kaptis ŝin je la vosto kaj komencis tiri. La Vulpino tiras internen, la hundo eksteren, ŝi internen, ĝi eksteren. Fine la hundo eltiris ŝin kaj disŝiris ŝian felon.

El la bulgara tradukis: KOLJO PANĈEV

VESA PASPALEEVA

ANJO

Kiu infano
suĉas fingreton,
tiun priridos
ĉiuj pupetoj!

Tiun priridos
kateto, hundeto,
ĝin pentros Danjo
en sia bloketo!

Anjo frapetas
per piedeto:

— Mi plu ne suĉos
mian fingreton!

Mi sola manĝos
per kulereto,
por ke enĉiu
Ĝicka-pupeto.

Tradukis: LJUDMILA PASPALEEVA

RADA LAZAROVA

LA KATO

Sur la kapon
de la kato
falas ŝtono el kotono.
Ĝi eksaltis,
ekrigardis
tiun bulon
el nebulo,
tuj komprenis,
ke jam venis
vintro tien.

Kaj la ŝtono
el kotono,
kiun sendis la nebulo
estis unu neĝobulo
sur la kapo
de la kato.

